estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ la mondo).

Numero 177 Januaro 2001

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Geoffrey Greatrex — preskontrolisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:
Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abono por Kanado aŭ Usono estas $8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas $15

✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰ ✰

## Aktualaĵoj Januaraj

Pro la malfrueco de ĉi tiu numero (pro kiu la redaktoro multe pardonpetas) oni jam povas konstati, ke la ĉiusemajna kvaron-hora esperantlingva programo de Radio Estonia en la interreto jam malaperis. Pro manko de mono oni ne plu povas aŭskulti la geparolistojn Ahto (Kaljusar) kaj Heljo (Vires?) kaj Eve (Oca?) aŭdigi esperantlingvajn programerojn pri diversaĵoj estonaj el la ĉefurbo de Tallinn. Dum pli ol jaro mi fidele aŭskultis ilin kaj multe ĝuis la raportojn, intervjuojn, kaj novaĵojn pri Estonio. Estas granda perdo por tiuj, kiuj interesiĝas aŭskulti aktualaĵojn parolitajn en la internacia lingvo.

Aliflanke, tiuj kun komputoroj ligitaj al la interreto ankoraŭ povas legi la faman gazeton El Popola Ĉinio ĉe la adreso < www.china.org.cn/ElPopolaCxinio >. La decembra numero estis la lasta presita surpapere, sed oni ankoraŭ povas legi ĝin pere de la propra ekrano. Multe pli bone ol se ĝi tute malaperis.

Fine, ni deziras danki al ĉiuj legantoj, kiuj jam reabonis por la nova jaro. Kiu ankoraŭ deziras (re)aboni, tiu sendu nur abon-pagon al la adreso de Reni Porter, kiu aperas supre. De tempo al tempo, kiel vi jam notis, la gazeteto alvenas tre malrapide ĉefe pro la kutima malfacileco de la redaktoro trovi taŭgan enhavon por dividi kun vi. Tial mi ĉiam bonvenigas viajn artikolojn kaj leterojn kaj sugestojn kaj eĉ plendojn. La adresoj (ret-poŝta kaj man-liverita) ankaŭ aperas supre.

— via redaktoro

# LETERO EL MORAVIO

Oktobro, 2000

Estimataj,

Mi tre dankas al vi pro la gazeto INTER NI. Al mi tre plaĉas artikolo pri Nova Skotio.

Ĉu mi jam skribis al vi ion pri mi? Mi nomiĝas Antonín Krejčíř kaj mi estas 36-jara edzo. Mia edzino nomiĝas Věra. Niaj du gefiloj nomiĝas Paŭlina (10-jara) kaj Tomo (7-jara). Ni loĝas en vilaĝo Troubky (2500 loĝantoj) en Moravio. Ĉeĥa Respubliko havas du partojn: Bohemio kaj Moravio. En nia familia domo ni nun loĝas nur du jarojn. Ni konstruis novan domon ĉar inundego en la jaro 1997 tute detruis nian domon kaj duonon de la vilaĝo. 350 domojn la inundego detruis, kaj mortis naŭ homoj. Sub la akvo estis duono de Moravio. Tio estis katastrofo. Ni ne sciis, kion inundo povas fari; ni konis tion nur el televidilo kiam estis inundoj en Francio, Usono, Germanio. Nun ĉiuj loĝantoj de mia vilaĝo scias, kion la akvo povas fari.

Mi estas esperantisto de Esperanto-klubo de Přerov (urbo 10 kilometrojn for de la vilaĝo Troubky). Nia klubo havas 35 geklubanojn, sed nur 5 geanoj regule ĉeestas la klubejon. Nia klubo havas tradiciojn ekde la jaro 1923 kaj mi ne volas, ke nia klubo malaperu. Nun mi estas klubestro, sed mi ne havas tempon por lernado de Esperanto kaj mi estas komencanto. Mi ŝatas Esperanton ĉar mi povas komuniki kun vi, mi povas lerni de via gazeto, kaj mi povas fari ion por progreso en Esperanto. Mia filino Paŭlina lernas en la lernejo la anglan lingvon; ceteraj infanoj ankaŭ lernas la anglan aŭ la germanan lingvojn. Tiuj estas malfacilaj lingvoj por lerni, kaj pro tio homoj ne havas intereson pri Esperanto. Sed ili ne povas tiel bone komuniki angle aŭ germane kiel tiu, kiu lernas Esperanton.

Pro la fakto ke mi ŝatis la artikolon pri Nova Skotio, mi reciproke sendas al vi gazeton pri Meza Moravio, pri mia lando. Mi deziras al vi ĉiuj bonajn tagojn. Multe da sukceso en via laboro kaj en Esperanto.

Kun saluto,

KREJČÍŘ Antonín

## BONVENON EN MEZA MORAVIO

En la koro de Moravio situas la distriktoj de Olomouc, Kroměříž, Prostějov kaj Přerov - turisma regiono de Meza Moravio en la Ĉeĥa Respubliko. Fundamenta parto de la regiono estas ebena teritorio, kiu jam ekde la 16-a jarcento nomiĝas Haná. Meza Moravio estas regiono kiu surprizas per la riĉeco de sia kulturo, folkloraj tradicioj, per neelĉerpeblaj religiaj memoraĵoj, muzeoj, burgoj kaj pliaj memor-

indaĵoj. Antikva urbo Olomouc estas post Prago la dua plej grava urba memor-rezervejo en la Ĉeĥa Respubliko. Biciklu kaj vi havas je via dispono pli ol 1400 kilometrojn de markitaj biciklo-traceoj. Plejparte ebena tereno en la regiono ebligas al vi sen granda penado vagi tra la regiono kaj ekkoni senpere korafablecon de senartifikaj Hanakoj, halti en gastejoj por bona biero kaj lokaj specialaĵoj. Ĉie vi trovas gastamon, bonan manĝadon kaj bonkvalitajn loĝlokojn. Alveturu kaj agrable surpriziĝu.

El turisma broŝuro. Tradukis Ludvik Chytil. Korektis Miloslav Pastrňák. Mallongigis via redaktoro.

## LINGVA PROBLEMETO

Instruistino pri la franca lingvo klarigis al sia klaso ke substantivojn en la franca, malkiel en la esperanta, oni gramatike difinas kiel viraj aŭ inaj. „Domo” en la franca estas ina („la maison”). „Krajono” en la franca estas vira („le crayon”). Scivolema knabo demandis, „kiun genron havas komputoro?” La instruistino ne sciis. Do, por ekzerco ŝi dividis la klason en du grupojn, sufiĉe konvene laŭ sekso, kaj petis ke ili decidu ĉu „komputoro” devus esti vira aŭ ina substantivo. Ambaŭ grupoj devis doni kvar kialojn por siaj rekomendoj.

La grupo de viroj decidis ke komputoroj certe devus havi inan genron („une ordinateur”) ĉar:

1. Neniu krom ilia kreinto komprenas ilian internan logikon.
2. La propra lingvo kiun ili uzas por komuniki inter si estas nekomprenebla al ĉiuj aliaj.
3. Eĉ la plej etajn erarojn ili konservas en longdaŭra memoro por ebla posta retrovo.
4. Tuj post kiam oni promese ligas sin al unu, oni konstatas ke oni elspezas duonon de la salajro por akcesoraĵoj.

Tamen, la grupo de virinoj konkludis ke komputoroj devas havi viran genron („un ordinateur”) ĉar:

1. Por kapti ilian atenton, oni devas doni al ili la povon.
2. Ili havas grandajn datumarojn sed ili ankoraŭ estas sensciaj.
3. Ili devas povi helpi vin solvi problemojn sed duontempe ili mem estas la problemo.
4. Tuj post kiam oni promese ligas sin al unu, oni konstatas ke se oni nur iom atendis, oni jam povus akiri pli bonan modelon.

☺ ☺ ☺ ☺ ☺ ☺ ☺ ☺ ☺ ☺ ☺